

JAPANIO: post la tertremego kaj la cunamo de 2011

La stacidomo Ŝinĉi en la gubernio Fukuŝima

La urbeto Ŝinĉi situas marborde de la Pacifika Oceano, plej norde en la gubernio Fukuŝima. Ĝi estas for de la nuklea centralo n-ro 1 de Fukuŝima, do ne suferis multe pro la radioaktiveco el la centralo, sed la stacidomo Ŝinĉi troviĝis tuj apud la maro, do la cunamo okazinta en marto 2011 facile detruis ĝin.

La suba foto montras, kia ĝi estis antaŭ la cunama atako. Ĝi estis tre modesta stacidomo kun malgranda domo kaj surfervoja ponteto.

Fotoj 1 & 2: Kiel aspektis la stacidomo antaŭ la cunamo.



La posta foto montras, kia estis la stacidomo post la cunama atako. Kiam venis la cunamo, unu trajno haltis, sed malmultaj pasaĝeroj forkuris kaj neniu viktimiĝis. Tamen pro la cunamo, la domo malaperis, la sur-fervoja ponteto difektiĝis kaj la vagonaro haltante tie kurbiĝis.

Foto 3: Tuj post cunamo

Mi vizitis la stacidomon en majo 2013. La suba foto montras, kia estis la stacidomo. Jam tiu fervoja ponteto estis malkonstruita kaj nur restis du kajoj kaj detruita necesejo. Tiu-ĉi maro estis bona naĝejo, do somere venis multaj turistoj, do troviĝis turisma urbeto, sed ĉio malaperis. Nur restis bazoj de domoj kaj dispeciĝinta granda kontraŭ-cunama digo.

Foto 4: post malkonstruado

Dum la postaj 3 jaroj mi ne havis okazon viziti la stacidomon, sed en decembro mi legis novaĵon, ke la 10an de decembro 2016 la linio ekfunkcios. La 26an de decembro mi vizitis la stacidomon, kaj surprize tie



aperis belega kaj moderna stacidomo. La reloj estis ŝovitaj **50 metrojn enlanden** kaj la tero estis altigita por eviti denovan cunaman atakon.

Antaŭ la stacidomo etendiĝas vasta tereno, por ke oni povu konstrui vendejojn, oficejojn kaj publikajn instalaĵojn. Por viziti la urbegon Sendai de Ŝinĉi oni bezonas nur iom pli ol unu horo, do la urbo povos funkcii kiel ĉirkaŭurbo de Sendai.

Antaŭ 5 jaroj la ĉirkaŭaĵoj de la stacidomo estis tiel mizeregaj, ke mi neniam antaŭvidis restariĝon de la stacio, do mi estis multe emociita vidi la nunan staton. Post kelkaj jaroj povos esti, ke ĉirkaŭ la stacidomo estas plena de vendejoj kaj oficejoj.

Foto 4: post rekonstruado

HORI Jasuo 2016-12 – 30a Ĉiuj fotoj de la aŭtoro.

Mapo de la homaj perdoj post la cunamo de 2011.
La stacidomo de Ŝinĉi situas iom norde de grava urbo Sendai.

